

ĈU ENAMIĜI?

Vortoj/muziko: E. Rovere (Manŭel)

Ĉu enamiĝi? Estas nenio por fari
por ne resanigebla romantikul',
kiu pri sentoj ne kapabkas avari
kaj ĉiam restos idealisma bonul'.
Do, enamiĝi...La fato tiel decidas,
se li renkontas inon, kia vi,
en kiu li, kun naiveco, ekvidas
la ĉarmon de anĝelo de l'edeno.

Amoiluziigoj revekiĝos ĉiuj,
promesoj viaj al li ŝajnos pura roso.
Ĝis kiam pulsos kor', ĝis la plej lasta spir'
li estos la kaptito de via dezir':
vi l'ideal', plej bela rev' realiĝinta.

Enamiĝinta...Perfingre tuŝi l'ĉielon,
provi la plej mirindan, varman senton.
Li vidas lumon funde de tunelo,
cerbo kaj koro perdas la prudenton.

Projektoj por l'estont': vi estos lia mond',
en manojn viajn metos li siajn esperojn.
Sed se, hazarde, via koro perfidos lin,
ŝajnos al li, ke venos tuj la mondo fin',
li ne plu havos emon, ne kapablos plu

reenamiĝi... Alian fojon, neniam!,
ĉar vi forŝtelis la animon lian
Li sentos sin estaĵo senvalora,
sen plu eĉ unu revo, malespera.

Sed tempo vundojn liajn resanigos,
l'espero vivovolon retrovigos,
ĉar elĉerpiĝos Amo, ja neniam!
Vivu la vio, tamen bela ĉiam!